GISTO-Junio-2002
VASKE, Georgo Otto
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
otto@caiweb.com.br
Senpaga legaĵo disdonata
dum la Verda Kafo, ĉiun lastmonatan sabaton
Lunĉejo Tutty's – Independência,30 – POA.
ĉiu E-parolanto estas bonvena.

RAPORTO AL ĈRI:

Konfirmita de pluraj aŭskultantoj, ĈRI bone aŭdeblas laŭ la frekvenco 7170 Khc, je la 11,00 UTC = nuntempe 08,00h. Kvankam oni aŭdas novaĵojn jam aŭditajn/legitajn/spektitajn, valoras la fakto ke oni aŭdas ilin ne kribritajn de la ĵaluzaj "Komunikadaj Reĝoj" kiuj ĉiam opakecas la konkerojn de rivakaj landoj. Tion oni klare povis observi dum la afero de la usona aviadila kraŝo okazinta jaron antaŭe landlime de Ĉinio. Okazis eĉ krimaj enmiksiĝoj en la frekvenco de ĈRI.

Lastatempe ĈRI atingas Sudamerikon kun bela signalo = 59++ tamen en kelkaj tagoj okazas QSB = La forteco de la signalo tre varias, pro la vintraj fenomenoj. Estas ĉiam plezuro aŭskulti la modelan elparoladon de ties geparolistoj. Paron da tagoj antaŭe iu grizulo, pola veterana aŭskultanto ornamis la programon per sia akurate agordita voĉo, kantante kelkajn konatajn melodiojn. Pasintan jaron alia viro (mi forgesas nomojn) bele kantis...Tumba-la-la. Ambaŭ plejzorge prononcis la vortojn. Al la ĈRI-skipo, gratulon pro la eltiraĵoj prezentitajkaj pro la zorgoplena prononco de la vortoj.

Rimarko: kvankam oni kontinue aŭdas ĈRI kun signalo kiu superas flankajn R-staciojn, en la dek kvara ĉimonata mi tute ne trovis ĈRI. Dubindas ĉu tiutagaj superakvoj en Ĉinio malhelpis la radion eĉ en Pekino. Bonvenus pravigo.

ÍKARO

Memore al sia 75-jariĝo VARIG publikigis specialan numeron de sia enfluge disdonata revuo ÍCARO. Ĝi enhavas tre interesajn tekstojn rilatajn al sia evoluo kaj vekas saudadon en ĉi grizulo, kiam la kariero komenciĝis per flugo en la malgrandaj Electra kaj poste per DC-3 tipaj avioj, kies bildojn ĝi montras.

En la revuo legeblas okazintaĵoj kiel tiu pri ino kiu en Parizo ekspedis al Brazilo, per Varig, kaĝon enhavanta hundon, adresitan al si mem, en ŝarĝaviadilo. Ŝi postflugis iom poste. Kiam la kaĝo alvenis ĝi kaŭzis enorman ŝokon al la tera personaro en POA. La hundo alvenis morta! Korpremite ili klopodis akiri hundon laŭeble similan al la morta kaj metis ĝin en la kaĝon. Kiam la ino alvenis kaj volis ricevi sian kaĝon kun la hundo, ŝi protestis: sed, tiu hundo ne estas mia. La mia estis morta. Mi antaŭsendis ĝis por esti enterigita en mia korto.

Alia okazintaĵo kiu spicas la revuon estis la fakto ke ŝarĝaviadilo kies komandanto estis iu tre bonhumora piloto, en dimanĉomatene ekflugis el RIO. Kiel kutime, sen PAX=pasaĝeroj. La tago hevis belegan veteron ĝis POA kaj la kurso ja estis laŭ la marbordo. La junaj skipanoj rigardis kaj bedaŭris ke ili ne povis ĝui la belan tagon sur la plaĝo meze de belulinoj. Pro la bela vetero ili flugis VFR=per vida kontakto (sur la tero) kaj do estis ne devigitaj teni difinitan flugnivelon. Tiu favoris ilin alrigardi la belaĵojn de pli prksime. Ili metis la nazon de la C-46 suben

kaj flugis laŭ la plej malalta nivelo, ĉ.300m super la tero. Longegaj marbordoj sen homaj enugiis la pilotojn. Jam proksime de Porto Alegre ili decidis iom ŝerci timigante fiŝistojn per rapida kaj malalta surpaso. Unu el ili tiom serioze ektimiĝis ke li saltis en la maron, pensinte ke la avio kraŝos sur li. Kiam la avio surtyeriĝis en POA la komandanton atendis mesaĝo: EKSIGITA. Klarigo estis la signaturo, de sinjoro Berta, la ĉefdirektoro de VARIG kiu estis plonĝinta en la maro. Sed, bonkorulo kiel Berta estis, baldaŭ la ŝerco estis forgesita.

EBLEC O REKLAMI

Lastatempe tre ofte oni legas en ĵurnaloj, ke pluraj klasoj en nia Provinco ne okazas ĉar mankas instruistoj pri pluraj lernobjektoj.Se al ni mankas financoj por kunvoki kunsidojn cele prelegi pri Esperanto, oni provu eluzi la ŝancon alparoli gelernantojn pri la elstaraj ecoj de nia kunfratiga lingvo. Ĉu ne vere ke oni daŭre kampanjas favore al la paco? Do ni proponu Esperanton kiel efikan rimedon por ŝanĝi la batalemon de nia junularo, ĉefe al lernantoj de la dua grado. En mia urbo sufiĉis alparoli la lernejestron. Li konsentis ke mi prezentis la bazan trajton de nia lingvo al pluraj klasoj. Domaĝe, lastatempe ne mankis instruistoj en mia urbo.

FABLO

Botelo da vino primokas litron da lakto: - Vi, blankulaĉo, vi estas tro pala. ĉu vi ne hontas montriĝi per tiu abomena koloro? Iru en la sunradiojn iom bruni ĝi. Tio plibonigas la sanstaton.

La lakto, furioza, respondas: - Miru, kiu predikas pri sano! Ĝuste vi, kiu malbonfartigas la homon, atakas la hepaton, ebriigas, terurigas gefamilianojn kaj malhelpas la homaron!

La vino ne submetiĝas kaj respondas: - Nu bone, ĉio kion vi diris, pravigeblas sed, restas grava detalo: mia patrino estas sukoplena traŭbo...la via...!

SCIVOLEMA